

# BULTENO de REU

OFICIALA INFORMILO DE RUSIA ESPERANTISTA UNIO  
№ 103, Aprilo 2019



## *Estraro de REU decidis*

### RUSIA ESPERANTISTA UNIO PROTOKOLO № 19 de la Estrara decido

**Dato:** Moskvo, 22.04.2019

**Voĉdonado:** reta

**Voĉdonis:** S. Smetanina, N. Gudskov, I. Gonĉarova, A. Lebedev, A. Mitin, V. Opletajev.

#### **TAGORDO / TEMO**

*Pri la kunvoko kaj organizo de la 30-a Konferenco de Rusia Esperantista Unio.*

#### **DECIDO**

1. Konforme al la artikolo 3.4. de la Statuto de Rusia Esperantista Unio kaj la artikolo 3.1. de la Ĝenerala Regularo de Rusia Esperantista Unio kunvoki la 30-an Konferencon de REU la 17-an – 18-an de julio 2019.
2. Okazigi la 30-an Konferencon de REU kadre de «Tiĥvinaj Esperanto-Metiejoj — 2019» en turista sporta bazejo apud Carina lago de la urbo Tiĥvino (Leningrada provinco), t.e. partoprenantoj de la Konferenco devas oficiale aliĝi al TEMoj. <http://temoj2019.online/>
3. Komisiu al la Prezidanto de REU S. Smetanina kunordigi kaj gvidi la Organizan grupon de la Konferenco kaj preparadon de la Konfrenco en aprilo – julio 2019.
4. Koopti en la Organizan grupon de la Konferenco la membrojn de la nuna Estraro de REU: S. Smetanina (Moskvo), N. Gudskov (Moskvo), I. Gonĉarova (Odincovo), A. Lebedev (Dolgoprudnij), A. Mitin (Niĵnij-Novgorodo), V. Opletajev (Surguto); la membrojn de la nuna Kontrol-Revizia Komisiono de REU: G. Basov, kunordiganto de KRK (Tomsko), A. Milner (Moskvo), Valentin Seguru (Mitiŝĉi).
5. Operative prezenti al la membroj de REU pere de «Bulteno de REU», reta grupo «REU» VK kaj dissendolisto «REU-AGADO» preparplanon kaj projekton de la Tagordo de la Konferenco (majo 2019).

#### **REZULTOJ DE LA VOĈDONADO:**

por: 6;


kontraŭ: 0;

sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: S. Smetanina

Vicprezidanto de REU: N. Gudskov

## *Regiona agado*



### **Internacia renkontiĝo de esperantistoj en Krasnodar**

Renee Triolle, fama franca esperantistino, ĉefdelegito de nacia Esperanto Asocio en UEA, ege ŝatas vojaĝi. Sole. Dum sia longa vivo ŝi vizitis multajn landojn kaj traveturis ilin perbuse: tage ekskursas, nokte veturas al alia loko. En iuj urboj kutime ŝi povas resti dum kelkaj tagoj, loĝante en iu modesta hoteleto nur por ordigi sin kaj ripozi nokte. Tiamaniere, ekzemple, Renee traveturis Aŭstralion kaj Sudamerikon.

Meze de marto Anatolo Ivasenko ricevis paperan leteron. Renee Triolle sciigis, ke estos en Rusio, ke emas nepre veni Krasnodaren, ĉar ŝia plej unua esperantisto-korespondanto eksterlanda loĝis tie en malproksimaj 1960-aj jaroj. En Jarlibro de UEA estis trovita reta adreso de Renee kaj, por ne perdi plu tempon, daŭran komputilan kunordigon faris Marina Kocarj.

La 2-an de aprilo Renee Triolle startis el Parizo aviadile, venis Moskven. Estante emerita instruisto pri la rusa lingvo, ŝi jam multfoje vizitis Sovetunion, poste Rusion, estis en diversaj anguletoj de nia lando. Ĉi-foje la emo de la vojaĝulino estis traveturi suden laŭ rivero Volgo, kun ekskursoj al apudvolgaj urboj kaj urbetoj. Post vizito en Rjazanj, Samara, Saratov, Volgograd, ŝi venis al Astraĥanj. Laŭ interkonsento ŝi telefonis kaj avertis, ke estos frumatene dimanĉon en Krasnodar. Tio estis ĝuste mezo de ŝia vojaĝo. Lunde, post noktumado en Krasnodar, sekvis Tuapse, poste Soĉi kaj duonmonata malrapida revenvojaĝo ghis Moskvo.

Nia negranda, sed ege gastama grupo de lokaj esperantistoj-aktivuloj tre bone funkciis tutan dimanĉon, la 14-an de aprilo. Ni renkontis la gastinon en la centra busstacio, enloĝigis en hoteleton decan, akompanis tra historia parto kaj ĉefa bela strato Krasnaja, kune spektis semajnfinan surĉevalan rajdadon de kubanaj kozakoj apud skvaro nome je Imperiestrino Jekaterina la 2-a, vizitis artan muzeon, kie ĝuis ekspozicion de rusaj pentristoj. Evidente, muzeaj oficistoj, robgardistino ekinteresiĝis pri Esperanto, demandis pri ĝi. Ili ricevis interesan informon pri kie kaj kiel oni povas lerni nian lingvon. Poste ni promenis plu laŭ la strato sub agrabla varma suneto, sidis sur benko, ripozante-babilante amike. En komforta kafejo teumis-kafumis. Denove perpiede promenis ĝissate. Enbusiĝis kaj venis al loĝejo de Nina Celikova, kie nin jam atendadis gastama mastrino kaj aromo de rusaj pelmenoj. Entute partoprenis en la bela renkontiĝo 6 plenkreskuloj (4 sinjorinoj, 2 sinjoroj) plus unu 4-jarulino. Apetito ne mankis, manĝaĵo bongustis, paroloj kaj tosto abundis. La gastino aprezis varman akcepton, ankaŭ bonan nivelon de lingvoposedo de krasnodaranoj. La vespero venis hazarde kaj senkomplete. Adiaŭis ni gaje kaj kore, interŝanĝis adresojn, suvenirojn. Ni pasigis kune la tutan tagon, akompanis Renee Triolle de kaj ĝis la hotelo kaj malfrunokte enhejmiĝis

*Marina Kocarj (Krasnodar)*

## Biblioteka nokto – 2019 – “Puŝkin surafiŝe”



Sabate la 20an de aprilo en Surguto en la Centra urba biblioteko okazis tradicia kaj populara soci-kultura amasa aktivajo “Biblioteka nokto”. Ĉi-jare ĝi estis dediĉita al la vivo kaj verkaro de Aleksandr Sergejeviĉ Puŝkin. En la Salono de lingvo- kaj landosciencoj mi gvidis la programon pri Esperanto. Ĝin partoprenis pli ol 30 gastoj, kiuj restis tre kontentaj kaj dankis por la vespero. Min helpis kaj asistis s-ro Amangeldi Maldibajev, konata surguta medicinisto, pasia diverstema kolektanto kaj esperantisto. La partoprenintoj de la vespera programo vigle partoprenis ĝin, informiĝis pri Esperanto, partoprenis provlecionon por ellerni tre simplan etiketan dialogon de interkonatiĝo, spektis videojn, interalie ankaŭ animacian filmeton “Sur mara bordo...” – «У лукоморья...», en kiu la versojn voĉlegas Aleksandr Osincev. Ĉiuj kuraĝuloj, kiuj aktive partoprenis la provlecionon, la kvizojn “Sekretaj alfabetoj” kaj “Poemoj de Puŝkin en Esperanto” ricevis premie lernolibrojn kaj informilojn pri Esperanto. Kelkaj personoj lasis siajn retadresojn por ricevi informojn pri aŭtuna kurso de Esperanto.

*Vladimir Opletajev*


## Aprila kunsido de la klubo «Renaskiĝo»



La 20-an de aprilo 2019 okazis vica kunsido de la klubo “Renaskiĝo” en Nijnij-Tagilo, kiun partoprenis ses esperantistoj. La tagilanoj preparis rakontojn pri la hejma urbo, pri la plej interesaj lokoj. Okazis tiel, ke la esperantistoj elektis kiel la ĉefan temon de la kunveno historion de lokaj katedraloj. Valerij Borodin priskribis tre belan Vijsko-Nikolskan preĝejon, fermitan en 1930 kaj ruinigitan en 1963 laŭ ordono de komunistaj aŭtoritatoj. Nun tie situas la kulturpalaco “Jubilejnij”, kie tagilanoj-esperantistoj kunvenas. Tiu tereno servis ankaŭ kiel tombejo de la konataj fabrikantoj Demidov.

Valerij Malcev prezentis skizojn de kelkaj katedraloj, ekzemple, de la katedralo Aleksandro-Nevskij kaj de Enir-Jerusalemaj preĝejoj, kiu ankaŭ estis ruinigita en 1930. Proksime de tiu loko nun staras la monumento al V.I. Lenin. Kio koncernas la katedralon Aleksandro-Nevskij, Valerij Malcev aktive partoprenis en ĝia restaŭrado kaj eĉ gvidis la procezon de la reinstalado de la kupoloj sur la preĝejon.

Do, la renkontiĝo fluis vigle kaj interese. Plejparte gravas, ke la klubanoj parolis Esperante. La majan kunsidon ni decidis dediĉi al aliaj temoj pri la kultura vivo en la urbo.



*Lidija Jerofejeva, Nijnij Tagil.*



## Kiel masianoj antaŭenigis Esperanton en la 8-a Lerneja Lingva Festivalo en Kalugo

La 8-a Lerneja Lingva Festivalo brile pasis en la urbo Kalugo. En la disdonata papera programo kiel ĉiam eblis legi: "Organizantoj de la Festivalo: administraro pri la klerigo de la urbo Kalugo kaj Resursa centro pri laboro kun talentaj infanoj ĉe subteno de Moskva Esperanto-Asocio MASI".

El prezentantoj de la Moskva Lingva Festivalo ni kolektis 11-homan grupon, ĉefe junularan. Nia teamo okazigis 16 lecionojn el 40 (dum la festivalo estis prezentitaj 35 prilingvaj programeroj, iuj pokelkfoje), rakontinte pri la antikvaj angla kaj islanda, ĉeĥa, ĉina, eŭska, finna, kria, litova, makedona, pola, serbokroata lingvoj kaj, kompreneble, pri Esperanto.



Lernejaj lingvaj festivaloj en Kalugo pasas laŭ la klasika modelo de la Moskva Lingvaj Festivaloj: Solena malfermo kun la Parado de prezentantoj, lecion-blokoj (en Kalugo tiuj estas tri) kaj Solena fermo kun koncerto kaj enmanigo de dankfolioj.

Esperanto estis prezentita trifoje en ĉiuj 3 blokoj.



La sperta festivalano Petro Fedosov, atinginta jam 14 jarojn, prelegis en la 1-a bloko. Ĉiam impona kaj atentokapta, li sukcesis dum la Parado de prezentantoj altiri atenton de multaj geknaboj. Sidlokoj por ĉiuj dezirantoj lin aŭskulti draste ne sufiĉis. Ĉio estis bone, tamen... ĉiam eblas perfektigi! Kaj Petro estas la homo, kiu kapablas konsideri konsilojn kaj korekti mankojn de siaj elpaŝoj.

En la 2-a bloko brile debutis la 15-jara Roman Ralko, antaŭ kelkaj monatoj mem lerninta Esperanton. Li sukcesis ne nur interesigi la publikon pri Esperanto kaj entuziasmigi la geknabojn per la propra ekzemplo de rapidega lingvolernado, sed ankaŭ amikiĝi kun ili kaj interŝanĝi ret-kontaktojn. En konstanta kontakto kun Roma mi estas ekde la 15-a de decembro 2018, kiam li venis al la odincova biblioteko por mia prelego, dediĉita al naskiĝtago de Zamenhof. Tiam li ankoraŭ malcerte legis "Ho, mia kor"! Post li vizitadis min por konsulti kaj preni necesajn materialojn kaj faris kelkajn prelegojn pri Esperanto en diversaj klasoj de sia lernejo. Do, lia prezentado estis farita antaŭ la festivalo – kaj fakte mi invitis lin al Kalugo, ĉar li jam ŝajnis esti sufiĉe preta. Sed kio vere surprizis min estas lia libera babilado en Esperanto kun Petro dum la vojo al la festivalejo. Kaj la prelego de Roma aspektis pli impone, ol mi traktis ĝin anticipe. Lingvaj interesoj de Roman estas tre vastaj. Ĉu el li iĝos same fidela esperantisto, kiel rezultis el Petro, nur tempo montros... Sed dume ni gratulu lin okaze de la unua festivala elpaŝo kaj ĝoju pri lia apero! Kompreneble, li aliĝis al MEA MASI.



En la 3-a bloko deko da knabinoj inspire surskribadis belajn bildkartojn dum la majstroklaso "Poŝtkruciĝo en Esperanto nun kaj ĉi tie". Jam duan fojon en kalugaj festivaloj mi uzas tiun metodon popularigi Esperanton, kaj ĝi al mi tre plaĉas. Esperanto ĉi tie estas uzata nature, kiel ilo, sed ne celo. Dum tiu horo la partoprenantoj sukcesis kompreni, kiel funkcias la internacia poŝtinterŝanĝo, lernis aranĝi poŝtkartojn kaj ricevis detalajn skribajn instrukciojn pri la teksto kaj gramatiko de Esperanto por hejme surskribi novajn poŝtkartojn. Kompreneble, intertempe ili eksciis

pri nia lingvo, pri Zamenhof, pri la alfabeto kaj ĉiuj gramatikaj reguloj de la teksto, proponita al ili por la surskribado. Menciindas, ke la tuta afero baziĝas sur la internacia MASI-projekto "Esperanto-Poŝtkruciĝo"

<https://bildkarto.wixsite.com/bildkarto>, kiu liveras al tiaj majstroklaso realajn adresojn kaj internacian subtenon.

Regule, sed nature sonas tra la festivalo, ke la kunorganizantoj estas esperantistoj. Kiu do eksciis pri Esperanto dank'al tiu ĉi festa evento? De jaro al jaro la nombro de la vizitantoj en Kalugo kreskas. Ĉifoje partoprenis ĉirkaŭ 500 homoj - delegitaroj el 33 urbaj mezlernejoj: orientitaj al lingvostudado lernejan, ĉefe 13-15-jaraj, kaj lingvaj instruistoj. Lingvojn kaj lingvistikajn prelegojn prezentis studentoj kaj profesoroj de Kaluga ŝtata universitato kaj aliaj altlernejoj kaj privataj lingvaj lernejoj de la urbo. Varma amika etoso kaj komuna intereso al lingvoj kaj kulturoj bonhumorigas kaj kunigas ĉi tie ne malpli ol dum Esperantaj amasaj aranĝoj.

Kiam naivaj gvidantoj de la finala koncerto demandis la publikon, kiu lingvo kunigis nin en tiu ĉi salono (celante respondon: la rusa), multaj kriis: Esperanto!



*Irina Gonĉarova  
kunordiganto de MEA MASI, direktoro de Moskva Lingva Festivaloj*

## Pri la Esperanta lernojaro 2018–2019

La Esperanta lernojaro 2018–2019 en Rusio eble jam atingis sian apogon. Multaj kursoj, kiuj komenciĝis somere kaj aŭtune, finiĝis, aliaj gvidataj kursoj daŭros ĝis la fino de majo. En kelkaj urboj, malgraŭ tre intensa varba kampanjo, kursoj ne povis okazi pro manko de aliĝintoj. Ĉi-jare konsiderinde riveligās sukcesa tendenco favora al la dumaranĝaj studadoj de Esperanto. Sed ankaŭ aliaj formoj de la kursoorganizado estas aplikataj. Mi ŝatus danki por la ricevitaj raportoj pri okazigitaj kursoj gesinjorojn Anatolo Masenko (Kislovodsko), Konstantin Obrazcov (Tomsko), Irina Gončarova (Odincovo), Fransoazo Oazo (Francio – Ĉuvaŝio), Vladimir Sapojnikov (Krasnojarsko). Ĉiuj rusiaj kursgvidantoj, sendepende de ilia aparteno al REU, estas petataj sendi informojn pri gviditaj diversnivelaĵaj kaj diverstipaj kursoj, por krei komunan datumbazon pri la Esperanto-instruado en la kuranta jaro.

Vladimir Opletajev,  
[surborde@mail.ru](mailto:surborde@mail.ru)

## Esperanto-kurso “Facetoj”



La aŭtora kurso de Esperanto “Facetoj” de Vladimir Opletajev estas eldonita meze de marto en Surguto. Tio estas 110-paĝa baza dulingva gramatika kurso de Esperanto, destinita por engrupa kaj memstara lernadoj. La lernolibron konsistigas la programo de la kurso, enkonduka ĉapitro, 12 lecionoj, bloko por taksado de lingvokonoj kaj kapabloj kaj Esperanturusa gramatika terminaro. La tradiciforma lernilo estis unue aprobata dum movadaj kursoj. Nun ĝi estas aplikata kiel baza lernolibro en aktuala koresponda kurso de Esperanto.

Mi dankas ĉiujn amikojn kaj kolegojn, kiuj helpis min per konsiloj kaj sugestoj.

Vladimir Opletajev

## *Bibliografio*

### Katalogo de rusiaj Esperanto-lerniloj, verkitaj, eldonitaj, enretigitaj en RSFSR kaj Rusio ekde 1957

La kvina parto, la antaŭaj partoj aperis en BdR n-roj 99–102

N <sup>o</sup>	Aŭtoro	Titolo	Eldonejo, urbo	Eldon- jaro	Eldon- kvanto	Nombro de paĝoj	Mallonga referenca noto	Bitversio, reta lernilo
43	Абольская М. (Абольская Мери Соломоновна)	«Методические разработки по языку эсперанто» ISBN XAA 131/БН2- 07102017/02	Ленинград, издательство «Конкордо»	1990	20000	88	Baza dulingva kurso de Esperanto por engrupa kaj memstara lernado.	

44	А. Григорьевский (Андрей Анатольевич Григорьевский)	“2055: автостоп в космосе”	3616819 avtostop2005all pdf	2006	-	56 PDF-paĝoj	Baza dulingva intensa kurso de Esperanto, verkita en formo de fikcia rakonto, destinita por memlernado.
45	Андрей Григорьевский (Андрей Анатольевич Григорьевский)	«ЭСПЕРАНТО. Полное описание и учебный словарь» ISBN 978-5-7161-0220-0	“Impeto”, Moskvo	2011	1000	32	Informilo pri faktoj kaj bazoj de Esperanto kaj ĝia gramatiko en la rusa lingvo kun Esperanta-rusa vortareto.
46	Б.А. Зозуля (Борис Алексеевич Зозуля)	«Знакомьтесь. эсперанто»	Rostov-na-Donu, Eldonejo “Verda kukolo”	1995	100	46	Kurta informa eseo pri la lingvo por interesiĝantoj kaj lernantoj de Esperanto.
47	Б.А. Зозуля (Борис Алексеевич Зозуля)	“Ne stumblu ĉe la gramatiko”	Rostov-na-Donu, Eldonejo “Verda kukolo”		100		Ekspliko de malfacilaj gramatikaj situacioj por lernantoj de Esperanto.
48	Б.А. Зозуля (Борис Алексеевич Зозуля)	«Эсперанто – русский словарь «ложных» друзей переводчика»	Rostov-na-Donu Eldonejo “Verda kukolo”	2004	100	58	Esperanto-rusa vortaro de falsaj amikoj de la tradukistoj.
49	Станислав Концевовский (Станислав Яковлевич Концевовский)	«Эсперанто-русский и русско-эсперантский словарь»	Kooperativo “KOPSO”, Moskvo	1988	100	77	Esperanta-rusa, rusa Esperanta vortareto kun ĉirkaŭ 1500 radikvortoj kaj kun konciza gramatika suplemento.
50	Станислав Концевовский (Станислав Яковлевич Концевовский)	«Эсперанто-русский и русско-эсперантский словарь»	Kooperativo “KOPSO”, Moskvo	1989	1000	84	Esperanta-rusa, rusa Esperanta vortareto kun ĉirkaŭ 1500 radikvortoj kaj kun konciza gramatika suplemento.
51	Станислав Концевовский (Станислав Яковлевич Концевовский)	«Эсперанто-русский и русско-эсперантский словарь»	Kooperativo “KOPSO”, Moskvo	1990	3000	130	Esperanta-rusa, rusa Esperanta vortareto kun ĉirkaŭ 1500 radikvortoj kaj kun konciza gramatika suplemento.
52	Семёнова З.В., Тетерин Г.Н. (Зинаида Васильевна Семёнова; Георгий Николаевич Тетерин) Научный редактор: С.Н. Подкаминер (Семён Наумович Подкаминер)	“Основы международного вспомогательного языка эсперанто, Учебное пособие”	Общество по распространению. политических и научных знаний РСФСР, Ленинградское. отделение, издательство «Новая книга», Ленинград	1958	2000	48	Dulingva baza kurso de Esperanto.


53	Mikaelo Bronŝtejn (Михаил Цалевич Бронштейн)	“Mamutido Miĉjo”. Libro por komencantoj. 1-a eldono ISBN 5-7161-0069-4	Eldonejo “Impeto”	2000	500	52	Helplernilo por bazaj kaj progresigaj kursoj de Esperanto kun Esperanta-rusa vortareto.
54	Mikaelo Bronŝtejn (Михаил Цалевич Бронштейн)	“Mamutido Miĉjo”. Libro por komencantoj. 2-a eldono ISBN 5-7161-0080-5	Eldonejo “Impeto”	2001	500	52	Helplernilo por bazaj kaj progresigaj kursoj de Esperanto kun Esperanta-rusa vortareto.
55	Mikaelo Bronŝtejn (Михаил Цалевич Бронштейн)	“Mamutido Miĉjo”. Libro por komencantoj. 3-a eldono ISBN 978-5-7161-0225-5	Eldonejo “Impeto”	2011	500	64	Helplernilo por bazaj kaj progresigaj kursoj de Esperanto kun Esperanta-rusa vortareto.
56	Mikaelo Bronŝtejn (Михаил Цалевич Бронштейн)	“Mamutido Miĉjo”. Libro por komencantoj. 4-a eldono ISBN 978-5-7161-0273-6	Eldonejo “Impeto”	2015	500	64	Helplernilo por bazaj kaj progresigaj kursoj de Esperanto kun Esperanta-rusa vortareto.
57	Mikaelo Bronŝtejn (Михаил Цалевич Бронштейн)	"Pri Dinjo, Diko kaj aliaj estaĵoj" ISBN 978-5-7161-0226-2	Eldonejo “Impeto”	2011	500	64	Instrua noveleto por la progresiga Esperanto-kurso.
58	Tatjana Loskutova (Татьяна Георгиевна Лоскутова)	Baza kurso de Esperanto.	<a href="http://www.gazetaro.org/mamutido/">http://www.gazetaro.org/mamutido/</a> <a href="http://www.gazetaro.org/mamutido/">http://www.gazetaro.org/mamutido/</a>	2017			19-leciona dulingva baza kurso de Esperanto, kreita surbaze de la legolibro por komencantoj “Mamutido Miĉjo” de Mikaelo Bronŝtejn. La lernilo estas destinita por engrupa kaj memstara lernado.
59	Л. Заменгоф	«Международный язык. Предисловие и полный учебник. Д-р Эсперанто». ISBN 5-7161-0115-1 Faksimila reproduktaĵo.	“Impeto”, Moskvo	1992	500	42	Antaŭparolo kaj plena lernolibro de la Internacia lingvo de doktoro Zamenhof. Reprintaĵo de la unua eldono.
60	Л. Заменгоф	«Международный язык. Предисловие и полный учебник. Д-р Эсперанто». 2-е издание. ISBN 5-7161-0115-1 Faksimila reproduktaĵo.	“Impeto”, Moskvo	2004	500	40	Antaŭparolo kaj plena lernolibro de la Internacia lingvo de doktoro Zamenhof. Reprintaĵo de la unua eldono.



61	Л. Заменгоф	«Международный язык. Предисловие и полный учебник. Д-р Эсперанто». 4-е издание. ISBN 978-5-7161-0304-7 Faksimila reproduktaĵo.	“Impeto”, Moskvo	2019	300	40	Antaŭparolo kaj plena lernolibro de la Internacia lingvo de doktoro Zamenhof. Reprintaĵo de la unua eldono.
62	Заменгоф Л.М.	«Полный словарь Эсперантского (международного) языка. / Plena vortaro rusa-internacia. Represo de 1905.» Antaŭparolo de E. Ŝevĉenko (ruse kaj Esperante). Часть русско-эсперантская: Plena vortaro rusa-internacia / Репринтное издание ISBN 978-5-7161-0181-4	“Impeto”, Moskvo	2007		264	Tiu ĉi vortaro estas faksimila reproduktaĵo de la dua eldono de la rusa-Esperanta vortaro de L. Zamenhof de la jaro 1905.
63	Анатолий Ионесов, (Анатолий Иванович Ионесов) Баходир Хабибов	«Internacia lingvo Esperanto. Эсперанто халкаро тили» ISBN 5-7161-0052-X.	“Impeto”, Moskvo	1998		232	Lernolibro de Esperanto en la uzbeka lingvo, verkita kunlabore kun la Internacia muzeo de Paco kaj Solidareco en Samarkando).
64	Б.В. Токарев (Борис Владимирович Токарев)	«Практическая грамматика эсперанто»	Москва, ASE	1980		20	Konciza gramatiko, destinita por lernantoj de Esperanto.

Por ĉi tiu parto de la katalogo (43 – 64) kunlaboris Vladimir Opletajev, Mikaelo Bronŝtejn, Nikolao Gudskov, Boris Zozulja.

## Novaj libroj



### Rusaj poetoj XVIII kaj XIX jarcentoj. Kolekto de poemtradukoj al Esperanto. Aŭtoro-kompilinto kaj tradukinto S. Rublov.

*Jaroslavo, Filigranj, 2019, 272 p. ISBN 978-5-6042230-2-4*

Estas eldonita nova, 2-a volumo de poemtradukoj de Sergej Rublov. (La unua, plene konsistanta el tradukoj de Puŝkin) aperis en 2002-a jaro).

S. Rublov estis fama tradukisto (mondfamas liaj tradukoj de fabloj de I. Krilov!), kaj publikigo de lia heredaĵo pliriĉigas Esperanto-kulturon kaj donas eblecon al nerusaj esperantistoj pli bone konatiĝi kun la rusa literaturo. Koncerne la lastan celon, la kovrilpaĝo de la libro estas iom misa: ĝi estas ruslingva kaj povas nur forpuŝi la atenton de nerusa potenciala legonto. Sed kio rilatas ĉion ceteran, ĝi estas bone eldonita, kaj enhavas paralelejn rusajn kaj esperantajn tekstojn, kio, interalie, donas bonan lecionon de tradukarto por komencantaj tradukistoj de la rusa poezio. Plej amplekse estas prezentitaj tradukoj el M. Lermontov, ankaŭ el N. Nekrasov, F. Tjutĉev kaj A. K. Tolstoj, aliaj poetoj estas prezentitaj per 1-2 verkoj, tamen la libro donas ĝenerale bonan bildon de la rusa poezio de la “ora epoko”.

La eldonon preparis Vadim Rublov, la filo de la tradukinto (kun helpo de V. Melnikov, V. Samodaj kaj M. Bronŝtejn), proprakoste. Se tiu ĉi eldono bone

disvendiĝos, ni havos la esperon pri apero de la tria volumo de la Rublov-a traduka heredaĵo. Akiri la libron eblas ĉe Svetlana Smetanina kontraŭ nur 280 rubloj + sendokostoj, turnu vin al ŝi: [svsmetanina@yandex.ru](mailto:svsmetanina@yandex.ru) Notindas, ke ankaŭ la Puškina volumo dume ankaŭ akireblas.

*In memoriam*

## Forpasis Aleksandr Ĥarjkovskij




Aleksandr Ĥarjkovskij (naskiĝis 01.06.1934) forpasis la 15-an de aprilo 2019. Esperantisto de 1957, li apartenis al la “festivala generacio” kaj estis bone konata al ĉiuj sovetiaj esperantistoj de pli granda aĝo. En 1982 li formigris al Usono kaj aktivis tie. Pli junaj nialandaj esperantistoj povis konatiĝi kun li en UK-oj kaj aliaj internaciaj aranĝoj, kiujn li partoprenis ankoraŭ en 2000-aj jaroj.




Aleksandro Ĥarjkovskij estis dum multaj jaroj nelacigebla partoprenanto de CRREROj (Centro-Rusiaj Regionaj Esperanto-Renkontiĝoj), kie multe prelegis pri diversaj interesaj temoj, ili allogis ĉies atenton. Li estis gaja, plenumura, interesa homo, ĉarma kaj neripetebla rakontanto. Lia elparolo de Esperanto estis senriproĉa kaj modela. Dum SEJToj li senlace rolis Neptunon. Tio estis veraj spektakloj! Improvizado, ridado, spontaneco – ni ĝuis tiujn festojn! Nur belaj rememoroj restas pri Aleksandro Ĥarjkovskij!

Profesie li estis ĵurnalisto (en sovetia vivperiodo kunlaboris kun “Znaniye – sila” “Vokrug sveta” kaj aliaj renomaj revuoj), kaj sukcesis publikigi artikolojn ankaŭ pri Esperanto (ekzemple, en la riga gazeto «Советская молодёжь»). La samon li daŭrigis en Usono, kie en tieaj ruslingvaj revuoj aperadis liaj eseoj pri esperantaj temoj. Li malkovris aŭ speciale emfazis esperantistecon de certaj famuloj, kiel, ekzemple, biologo kaj sociologo Sergej Ĉaĥotin kaj hipnotisto Wolf Messing. La plej granda lia verko pri

esperantisto estis la libro «Человек, увидевший мир» (La homo, kiu ekvidis la mondon) pri Vasilij Eroŝenko (Moskva, «Наука», 1978).



Kvankam lia stilo estis tre ĵurnalisme leĝera kaj foje en liaj verkoj anstataŭ realaj faktoj aperadis aŭtoraj fantazioj, liaj meritoj en diskonigo de Esperanto inter ruslingvanoj estas nekontesteblaj, kaj liaj artikoloj kaj la libro ĉiam restos grava fonto por scioj pri elektitaj de li herojoj. Li kaj lia kontribuo al la Esperanto-movado estas neforgeseblaj.



Ni kondolencas al ĉiuj liaj parencoj kaj amikoj.

*Estraro de REU*

---

**Bulteno de REU (BdR) estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo “RUSIA ESPERANTISTA UNIO”**  
BdR atendas viajn lokajn, regionajn novaĵojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov [nikolao@yandex.ru](mailto:nikolao@yandex.ru) aŭ (kaj)  
Svetlana Smetanina [svsmetanina@yandex.ru](mailto:svsmetanina@yandex.ru)

*Estraro de Rusia Esperantista Unio*

Redaktofino 28.04.2019